



LA JUNIA VIVO



ORGANO POR LA INFANOJ

T.J.O. CENTRO, WEST-GRAFTDIJK, NEDERLANDO, ĜIRO 382363 • JARKOTIZO 1.- NED. GULD. AŬ EGALVALOPO

GRANDA TUMULTO (daŭrigo).



Antaŭ la vintro-monatoj la sud-orientaj ventoj kelkfoje alportas grandajn arojn da akridoj el Afriko. En grandaj, nigraj nuboj la *fi*-insektoj alvenas, malsuprenflugas al la verdaĵo kaj formangegas ĉiom. Tio estas granda perdo. Tial la tuta loĝantaro forlasas *siajn* domojn

por ŝirmi *siajn* ĝardenojn, fruktarbejojN kaj kampojN kaj klopodas forpeli la akridojN ĉiel.

Ĉie iras homoj — granduloj kaj malgranduloj — kun kaldronoj, ladaj siteloj kaj *tiaj* objektoj. Per fajrostangoj, fajropreniloj kaj *tia* ilaro ili faras bruegoN por ke la tumulto timigu la malbonvenajn bestojN kaj forpeli ilin.

Ĉie oni faras grandajn fajrojN, kies densa fumo devas ekstermi la insektojN.

Oni bezonas ĉies helpoN kaj ĉies bruoN.

Ankaŭ la familio Novano faras *siaN* ebloN. Patro kaj Felipe prizorgas la fajrojN; la aliuloj faras bruoN; eĉ Gracia havas patoN kaj bastonoN.

Kia haoso kaj *kia* tumulto. Malgraŭ la mizero Patrino devas rideti. La malgranduloj estas *tiel* fervoraj; ili kuras tra la tuta ĝardeno, faras bruegoN; ili ĝojas kaj ridegas.

Fine la danĝero estas for. Ĉiuj iras al la domo por ke ili povu ripozi.

„Hè! Hè!” diras Felipo. „Ĉi tiu dimanĉo ne eŝtis tago de ripozo, Patro.”

Patro ridas. Li levas GraciaN: „Vivu Gracia! Ŝi forpelis la akridojN.”

La bovino (verkaĵo).

La bovino estas mambesto, kaj ankaŭ dombesto. Ĝi havas felon. Malantaŭe ĝi havas voston, kun je unu fino kvasto, kaj je la alia la bovino. Per tiu kvasto ĝi forpelas la muŝojn. Alie tiuj falus en la lakton, kaj kaŭzus malsanojn. Antaŭe estas la kapo. Sur ĝi estas la kornoj, kaj en ĝi estas la buŝo. Tiujn kornojn la bovino uzas por kornobati, kaj per la buŝo ĝi blekas.

Sub la bovino pendas la lakto. Kiam oni tiras, la lakto elfluas. Tio neniam finiĝas. Mi ankoraŭ ne eltrovis, kiel tio eblas.

Traduko el Sud-Afrika lerneja gazeto.

Sarado (la solvo aperos en la aprila No.).

La unua silabo estas persona pronomo.

La dua estas alia persona pronomo.

La tria estas la nomo de iu konsonanto.

La tuto estas terura afero, kiu ĉiam malfeliĉigas la homojn.

L. Chasseraud, Royan, Francujo.

Kombil-enigma.

1 2 3 4 5 6 7 Ĉiu „dento” estas 5-litera vorto.

x x x x x x x 1. Blanka, brila globeto, ofte tre multekosta.

. 2. Insekto, kiu produktas mielon. 3. Publika

. veturilo, sur reloj. 4. Cirklo. 5. Ronda mem-

. brano en la okulglobo. 6. Frukto kun tre mal-

. mola ŝelo. 7. Frukto, kiu liveras multe da bona

oleo. Sur la krucoj (horizontale) venas virina nomo, kiun precipe

infanoj tre ofte diras.

Sendu la solvon al TJO-Centro, West-Graafdiijk, Nederlando, antaŭ la 1-a de majo. Inter la solvintoj ni lotumos belan premion!

La solvo de la enigmo en la januara numero estas: Internacia Junular-Kunveno. La vortoj estas: cent — turo — jaro — valori — kunulo — nikelo — unu — en — ankro — tunelo — velki.

La premion gajntis: Wichert Kuipers, en Haarlem, Nederlando.

Kiu volas ion scii?

Kiom aĝaj la vegetaĵoj iĝas?

Ekzistas unujaraĵ, dujaraj kaj multjaraj kreskaĵoj.

La lino estas unujara. La malgranda, belega, blua miozoto estas jen unujara, kaj jen dujara. La beto estas dujara. La ranunkolo vivas du aŭ tri jarojn, la lekanteto kvar aŭ kvin. La rozo, kontraŭe, iĝas pli ol dek jarojn aĝa. La ulmo, se ĝi ne malsaniĝas, povas atingi aĝon de cent jaroj. Oni ne scias certe, sed eble la kverko povas iĝi miljara!

Sed — ĉiu viva estaĵo devos morti.

Rogiero.

Nia vilaĝo.

Ni loĝas en la komunumo Schoorl. Schoorl estas malgranda vilaĝo ĉe la dunoj. Ĝi estas tre bela vilaĝo. Schoorl konsistas el diversaj partoj. Groet (Ĥrut) estas la plej bela vilaĝo de la komunumo Schoorl. La dunoj en Schoorl kaj Groet estas tre larĝaj kaj belaj. Schoorl havas tre belajn arbarojn en la dunoj; tie oni povas promeni tre longe. En la dunoj de Groet kreskas eriko kaj pinarboj. Tra la dunoj kondukas mallarĝaj vojoj al la marbordo. La marbordo apud Groet estas tre larĝa. Unu kilometron de Groet kuŝas Kamperduin, ankaŭ ĉe la dunoj. Kamperduin estas malgranda banloko. De Kamperduin oni povas iri per aŭtobuso al Alkmaar. En Alkmaar estas en la somero, je ĉiu vendredo, fromaĝfoiro. La fromaĝfoiro estas tre interesa.

Do, venu al Schoorl, Groet, Kamperduin kaj Alkmaar en la somero!

Verkaĵo de Klaas Bant, 12-j. knabo en Groet (Ned.).

Ludo („Naz-kuriero“).

La ludantoj de ĉiu grupo staras unu post la alia. La grupoj staras paralele. Numero unu de ĉiu grupo havas sur sia nazo la eksteran parton de alumet-skatoleto. Tuj kiam la gvidanto fajfas li (aŭ ŝi) turnas sin kaj klopodas premi la ingon sur la nazon de la sekvanta ludanto. Ĉe tio ambaŭ ludantoj tenas la manojn sur la dorso. Se la ujo falas, tiu, kiu laste havis ĝin sur la nazo devas klopodi relevi ĝin per la nazo. Oni ne rajtas uzi la manojn. Tiel la tuta grupo transdonas la ingon, ĝis la lasta ludanto, kiu kun la ingo sur la nazo, iras al la gvidanto. La grupo, kiu unue alvenas gajnas la konkurson.

La rompita vitro.

La knaboj de iu knabo-lernejo rompis vitron.

La instruisto demandis: „Kiu rompis la vitron?”

Neniu respondis.

„Mi donos al ĉiu el vi du baston-batojn, se neniu diras kiu rompis la vitron!”

Sed ree neniu respondis. La instruisto donis al ĉiu knabo du batojn, sed ĉe la lasta knabo li demandis: „Se vi diros, kiu rompis la vitron, mi ne punos vin.”

„Bone, sinjoro,” respondis la knabo. „Mi rompis la vitron.”

Kees Groot (16-j.), Groet.

Cu tro multekoste?

En la granda fabriko regis konfuzo. Unu el la plej gravaj maŝinoj rifuzis, kaj oni ne sukcesis funkciigi ĝin. Post multa klopodado oni decidis venigi la inĝenieron, kiu muntis la maŝinon. Li venis. Dum kelka tempo li turnis ĉiajn ŝraŭbojn. Fine li prenis martelon kaj donis per ĝi malfortan baton sur iun parton de la maŝino. Kaj jen la miraklo: la maŝino ree funkciis!

Sed kiam la inĝeniero donis la fakturon — 100 guldenoj — la direktoro opiniis tion tre multa. Li ja donis nur unu martelobaton! Ĉu tio estis tiom da peno?

La inĝeniero diris nenion. Li reprenis la fakturon kaj skribis novan: Por unu martelo-bato 0,10 guld.
Por trovi la ĝustan lokon 99,90 guld.

Sen plua marĉandado oni pagis la fakturon.

DENASKA ESPERANTISTARO-RUBRIKO.

Robert Robertson †.

La 27-an de februaro mortis la fondinto kaj prezidinto de Denaska Esperantistaro, Robert Robertson. Li havis 86 jarojn.

Jam de kelka tempo li sentis, ke la fortoj forlasis lin kaj li proponis, ke TJO transprenu la aferojn de D. E. En Ipswich li en aŭgusto '47 ĉeestis en la kongreso de TJO, kaj la ĉeestintoj certe memoros la afablan, modestan maljunulon, kiu kun videbla plezuro observis la gajan ludadon de la junularo. Ankaŭ en la laborkunsido li ĉeestis kaj esprimis sian ĝojon, ke la kongreso unuanime akceptis lian proponon pri la transpreno de Denaska Esperantistaro.

S-ino G. P. Weston ĉeestis la funebran diservon je la 4-a de marto kaj alportis florojn de D. E. kaj T.J.O. kiel lastan saluton al nia kara onklo Roberto.

Si daŭrigos sian agadon kiel sekretario de D. E. en kunlaboro kun TJO, tiel honorante la memoron pri la pioniro Robertson, al kiu ŝi deziras ke Dio ripozigu lian grandan animon, kion plene substrekas la estraro de TJO.




INTERNACIA JUNULARKUNVENO

en Groet, Nederlando (3-10 aŭg. '48).

Kun granda bedaŭro la ĉeĥoslovaka ĉefperanto sciigis, ke li pro la okazantaĵoj en sia lando *ne* povas akcepti la respondecon pri Internacia Junular-Kunveno. Li petis, ke la nederlanda sekcio ĉijare transprenu lian taskon, kiun ĝi plezure akceptis.

Ĝi tuj aktive eklaboris kaj elektis Groet kiel kunvenejon.



En Groet, la pentrinda vilaĝeto inter la dunoj, apud la Norda Maro, kie en 1938 fondiĝis TUTMONDA JUNULAR-ORGANIZO, ni do ĉijare festos ĝian 10-jaran ekzistadon!

Provizore ni fiksas la daton je 3-10 aŭgusto.

La komunumestraro de Schoorl jam konsentis ke ni povos uzi la popollernejon en Groet, kaj la belan grandan gimnastikejon. Plue ni verŝajne povos disponi pri la kunvenejo de la Katolika Unuiĝo. Ni klopodos lupreni litojn, se tio montriĝos malebla oni dormos en pajlo.

Diversaj ekskursoj jam estas planataj: Kompreneble ni vizitos la mondofan fromaĝfoiron en Alkmaar. Se eble ni per granda salon-

ŝipo veturos al Amsterdam, preter la pentrinda „Zaan-regiono”, kun ĝiaj pitoreskaj lignaj dometoj kaj modernaj fabrikoj. Ni vizitos Edam kaj Volendam. Ni promenos tra la belegaj dunoj de Schoorl, kaj ludos sur la larĝa marbordo de Camperduin. — Ĉiuvespere ni havos feston (espereble estos multaj artistoj inter la partoprenantoj!).

Ĝeamikoj, la nederlanda sekcio faros ĉion por organizi kiom eble plej bonan kunvenon. Venu do grandnombre!

Verŝajne la kostoj estos proksimume 20 guldenoj, sed pri tio ni pli detale informos en la venonta numero, kiam ni precize scios la kostojn de la ekskursoj, ktp.

Anoncu vin jam nun al la loka organizanto S-ro W. Bant, Wagemakersweg A 154a, Groet, Nederlando.

Ne prokrastu la anoncadon, ĉar ni atendas multajn gastojn kaj nur estos loko por proksimume 250 partoprenantoj!

La Infaninterŝanĝo.

Tre bedaŭrinde mi povas nur malmulte sciigi al vi pri tio.

Nur la „Verda Junularo”, grupo en Landeck (Tirolo) skribis al mi. Tiu grupo povas gastigi 18 geknabojn, senpage, dum du semajnoj. Ili jam planas ekskursojn por la partoprenantoj al Innsbruck, la „Hafelekar”, kaj al la ski-paradizo sur la Arlberg. Vizito al tiaj samideanoj en Landeck certe fariĝos bela festo! Jam anoncis sin 12 partoprenantoj. Ili ne ĉiuj estas junaj infanoj, sed „grandaj” infanoj, ĉiuj TJO-anoj.

La vojaĝkostoj estos proksimume 90.— guld. Ni bezonos permeson (permit). Por tio mi devas scii viajn: nomon, antaŭnomon, naskiĝdaton kaj lokon. Do, ĝeamikoj anoncu tion al mi!

Ankaŭ partoprenantoj el aliaj landoj estos bonvenaj, do esperেble ankaŭ de tie venos anoncoj!

Koresponda adreso: S-ro W. Bant, Wagemakersweg A 154a, Groet (Ned.).



SKOLTA RUBRIKO.

16-jara Jubileo de Szegeda Skolta Esperantista Rondo. — En la nomo de la Szegeda Skolta Esperantista Rondo mi sendas miajn korajn salutojn al ĉiuj skoltoj en la vasta mondo.

„Tiu skolto, kiu ne parolas esperante, similas al sonorilego al kiu mankaŝ la tonbatilo, kaj al rivero en kiu ne estas akvo.” — Jen la devizo de nia rondo.

Ni estas junaj skoltesperantistoj, kaj ni jam faris bonan laboron por Esperanto en nia urbo. Ni memoras la pli aĝajn skoltesperantistojn, kiuj partoprenis en multaj eksterlandaj tendaroj, ili estis en multaj mondkongresoj, foiroj kaj ekspozicioj. Ni sekvas ilin. Ankaŭ

ni estas fortaj kaj perfektaj skoltesperantistoj. Ankaŭ ni iros al mondkongresoj kaj montros la hungarajn vivon, celon kaj kulturon. Ni laboros por la Baden Powel-Skoltismo kaj por la Zamenhofa Esperanto-movado.

Ni vokas kaj atendas ĉiujn geesperantistojn en Hungarujo por la Centjara Liberecfesto je la 15-a de marto en 1948.

Bonan laboron, Csonka-Lajos.

TJO-RUBRIKO.

(Sokr. M. v. d. Horst, Joh. Idastr. 32, Rotterdam, Ned.).



Pro la lasttempaj enlandaj politikaj okazintaĵoj en Ĉeĥoslovakujo la agema ĉesperanto petis la estraron repreni la mandaton por organizi la Int. Jun. Kunvenon 1948. La estraro tuj eklaboris por solvi la proble-

mon kaj invitas nun la TJO-anaron al la I.J.K. en Groet, Nederlando.

T.J.O. fondiĝis en Groet, dum la unua I.J.K. en 1938. Nun, en 1948, ni tie do festos la dekjaran ekzistadon.

Tutmonda junularo, grandnombre partoprenu ĝin! Detalajn informojn vi povas legi sub la rubriko „Internacia Junular-Kunveno”.

Denaska Esperantistaro: Provizore ni faris jenajn aranĝojn: S-ino G. P. Weston, Cecil Road, London N. 10, tute prizorgos la administradon de la brita D. E.-anaro. Ĉiujn mensendojn, aliĝojn de britoj, oni do sendu al ŝi. Por ĉiuj ceteraj landoj oni skribu al la TJO-sekr.

S-ino Schmidova, la TJO-perantino en Egiptujo, pro baldaŭa transloĝiĝo al alia lando, abdikis. — Ni dankas ŝin pro ŝiaj penoj por TJO.

Financoj: Por ĉiuj pagoj por TJO, do por kotizoj (ankaŭ por Denaska Esperantistaro), „La Juna Vivo”, kaj la TJO-Libro-Servo vi nun ankaŭ povas uzi la TJO-konton ĉe U.E.A. De el landoj, kie montransendoj ne eblas, oni povas pagi per respondkuponoj rekte al la sekretario de TJO. El Germanujo oni ne plu sendu poŝtmarkojn, ĉar tiuj en Nederlando estas senvaloraj.

Filmservo: De la filmo, farita dum la I.J.K. en Ipswich, en 1947, la filmservo farigis du kopiojn. Unu kopio estas en Anglujo ĉe f-ino Rees. Por prezentadoj en Britujo oni rilatu kun ŝi. La alia kopio estas por prezentadoj en Nederlando. La TJO-filmservo, s-ro H. J. Schut, Hoofd O.L. School, Donkerbroek (Fr.) ludonas ĝin po f 5,— por ĉiu prezentado.

KORESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto aŭ grupo unufoje jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.

Belgujo: Mi petas sendi al mi bildkartojn (afrankitajn bildflanke) el via ĉirkaŭaĵo. Mi rekompencos per il. pk. el Belgujo. A. Scheldeman, Rue Wahis 186, Menin.

Cehoslovakujo: Mi dez. kor. pri kutimoj kaj okazantaĵoj, interŝ. poŝtm. kaj bildk. Bohuslav Kostínek, Karlovy Vary, Nebozizek 15.

Otokar Hoffmann, Fakinstruisto, Otrokovice, interŝ. pm. k.l.t.m. Li serĉas gekorespondantojn por siaj 11-15-jaraj gelernantoj.

Jirí Novotny, 15-j., Praha XIX, Komornická 12, dez. kor. kun samaĝuloj en ĉiuj landoj. Certe respondos.

Ĉinujo: Prof. d-ro lo Chou, prezidanto de „Instituto Entomologia de Chou”, Chang-Chia-Kang, Shensi, Ĉinujo, dez.kor.k. ĉiulandaj entomologistoj, zoologistoj kaj filatelistoj.

Germanujo: 15-j. esperantisto Ewald Ebmeier, (21a) Bünde i. W., dez. kor. kun nederlandanino, samaĝa.

Sepp Hönig, (20b) Bad Harzburg, Hotel Schmeizer, serĉas kor. por si mem kaj por sia amikaro. Oni afranku filatele!

Kurt Hoeber (17a) Heidelberg, Postfach 30, dez. interŝ. leterojn kaj poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

Hungarujo: Josefo Bangha-Varga, Zöldfa-u 1/b, Györ, 27-j., teknika oficisto, dez. kor. kaj serĉas kor. por siaj grupanoj, 18-30-jaraj.

Károly Matuz, gimn. lernanto, 16-j., Nyiregyháza, Szent István-u. 18, dez. kor.k. gejunuloj en la tuta mondo, pri ĉiuj temoj.

Jugoslavujo: 38 Gestudentoj de ŝtata dentista lernejo en Zagreb dez. kor.k. samideanoj en la tuta mondo, prefere pri dentist-arto, radiofonio, junulara vivo. Adr: Branko Grbac, Gundulića strato 15/11, Zagreb.

Nederlando: Esp. grupo en Schoorl aranĝos letervesperon en Aprilo. Bonvolu sendi esperantaĵojn, il.poŝtk., let. al Wim Selhorst, Voorweg, Schoorl. Respondo garantiata.

S-ro J. M. Toorneman, Diepenweg 169, Deventer, malsana jam pli ol 16 mon. afable petas leterojn, bildkartojn kaj gazetojn. Antaŭe kore dankas.

Polujo: s-ro Adam Krajewski, Gdynia, Mickiewiczza 16, (21-j. fraŭlo), dez. kor. pri ĉiuj temoj ĝeneralaj. Respondo certa.

S-ro Glińiecki Stefan, Gdynia, Slupecka 37 (21-jara fraŭlo) deziras korespondi pri ĝeneralaj temoj. Respondo certa.

La TJO-grupo ĉe Sniadecki Gimnazio, Pabianice, Partyzancka 56, organizos en junio-julio grandan E-to ekspozicion. Oni sendu leterojn, kartojn, ĉiajn esperantaĵojn, fotojn, nacilingvaj gaz., ktp.